# la naska fasko

Ĉiutaga ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto

Numero du
2008-07-01
Mardo

## ReNASKiĝo

Alveninte al NASK je la dua fojo, ni—t.e. Birke kaj Bertilo—sentas nin renaskitaj. Fariĝis somero, ni liberiĝis de la ĉiutago en Koreujo, ni alvenis al Ameriko, kiu estas ankoraŭ mistera kaj fascina kontinento por ni, kaj ni revenis al NASK, kiun ni vizitis antaŭ tri jaroj, en Brattleboro, kaj kiun ni tiam ĝuis plene kaj plezurege.

NASK donas al ni instruistoj maloftan okazon instrui intense dum pluraj semajnoj al lernantoj kun arda kaj verva intereso por Esperanto kaj kun granda motiviĝo lerni multon en koncentrita tempo kune kun amikoj en belega ĉirkaŭaĵo.

NASK donas al vi lernantoj elstaran okazon profundigi viajn sciojn de la Internacia Lingvo. Ni pensas, ke vin envias multaj novaj kaj malnovaj parolantoj de nia lingvo tra la mondo. Do, plene fruktuzu vian tempon ĉi tie. Ni provos vin helpi laŭ nia kapablo. Ni estos ĉiam je via dispono por demandoj kaj por ekzerciĝo, sed kompreneble precipe en la lecionoj.

Niaj kursoj ekzistas ankaŭ en virtuala formo. Jen la adresoj de la blogoj (= retaj taglibroj) de la Meza kaj la Supera kursoj:

- *La Supera Blogo* (provizora nomo): **http://bertilow.com/nask-2008-3/**
- *La Meza Blogo* (provizora nomo): **http://bertilow.com/nask-2008-2/**

Ni esperas, ke tie verkos precipe **vi**. Tie vi povas enmeti la finajn versiojn de viaj hejmtaskoj aŭ ĝeneralajn cerbumojn, ideojn aŭ rakontojn laŭ via plaĉo. Bonvenon al la blogoj!

Ek al la lernado!

—Birke kaj Bertilo




## Kalembura kadro

Ĉu vi jam solvis la hieraŭan enigmon? Ĝi estis… **"litera-turo"**!

Por la hodiaŭa, jen iom da helpo: la solvo havas 5 literojn: __ __ – __ __ **O**

# El la kalendaro:

Ĉu vi scias, ke la plej freŝa kalendaro aperas en la reto? La adreso estas:
**http://esperanto.org/nask/kalendaro**

| | hodiaŭ | merkredo | ĵaŭdo | vendredo |
|---|---|---|---|---|
| **matene** | 9 atm–12:20 ptm: klasoj | 9 atm–12:20 ptm: klasoj | 9 atm–12:20 ptm: klasoj | *Nacia Tago: neniuj klasoj!* |
| **post-tagmeze** | *libera* | *libera* | 1:45 ptm: ekskurso al la akvario *Birch* | *libera* |
| **vespere** | 7 ptm: Interkona Vespero (komuna salono en *Cuzco*) | 7 ptm: Lusi parolas pri *Pasporto al la Tuta Mondo* | 7 ptm: USEJ-aferoj kun Brandon | 6 ptm: ekskurso al La-Jolla por vidi la fajraĵojn |

# John MUIR

Niaj klasĉambroj estas en konstruaĵoj de "Muir College", unu el la kvartaloj de UCSD. La nomo honoras al John MUIR, usona natur-sciencisto kiu forte subtenis konservadon de la usonaj arbaroj kaj sukcesis pri la starigo de la naciaj parkoj Sequoia kaj Yosemite (en 1890).




John MUIR aperas sur la kvarondolara monero de Kalifornio

Li naskiĝis en Skotlando en 1838, kaj migris kun la familio al Viskonsino en 1849. Li studis ĉe la Universitato de Viskonsino, komencis karieron kiel inventisto de meĥanikaj aparatoj, sed post akcidento lasis tiun laboron kaj sin dediĉis al naturo. Li piediris de la meza parto de Usono ĝis la Golfo de Meksiko, verkante taglibron kio aperis libroforme (en 1916, post lia morto) sub la titolo *Milmejla Promeno al la Golfo*. En 1868 li vojaĝis al la Valo Yosemite en Kalifornio, kaj poste iris al Nevado, Utaho, Oregono, Vaŝingtono, kaj Alasko por studi la arbarojn kaj glaĉerojn. Li estis la unua sciencisto kiu analizis la topografion de Yosemite kaj deklaris ke ĝi estiĝis pro glaĉera erozio.

Ek de 1876 li rekomendis al la federala registaro starigi programon por konservado de arbaroj. En 1897 prezidento Grover CLEVELAND subskribis leĝon por krei 13 naciajn arbarojn kaj konservi ilin kontraŭ komerca ekspluatado. Diversaj komercaj grupoj persvadis la usonan Kongreson prokrasti la efektivigon de la leĝo, sed Muir verkis artikolojn por la gazetaro kaj sukcese ŝanĝis la sintenon kaj de la Kongreso kaj de la usona popolo, subtene al arbaraj rezervejoj.

En 1908 la registaro starigis la nacian monumenton "Muir Woods" en la Kalifornia konteo Marin.

Muir mortis en 1914 en Los-anĝeleso.

Fonto: *Enciklopedio Britannica*, 2008. Tradukis Lee MILLER

# Ekskursojn: vi elektu!

Kien vi volas iri? San-Diego kaj La-Jolla havas multege da vidindaj lokoj: belegaj plaĝoj, parkoj, muzeoj, mondfama bestĝardeno, diversaj restoracioj, kaj pli.

Mi klopodos organizi nur unu "oficialan" programon en ĉiu tago—aŭ posttagmeze aŭ vespere. Malofte en unu tago okazos ambaŭ posttagmeza kaj vespera programo, ĉar vi bezonas tempon por hejmtaskoj, por ripozi, kaj por fari viajn proprajn ekskursojn. (Sed kompreneble, neniu ekskurso estas deviga; ekster la klasoj vi rajtas fari ion ajn, kion vi volas.)

Ĉu vi deziras promeni? Butikumi? Sunbaniĝi? En venontaj numeroj de la *Fasko* mi proponos diversajn eblecojn, kaj mi atendos viajn reagojn. Kompreneble, mi bonvenigas ankaŭ viajn proponojn!

Vi povas atingi min per <hoss@lodestone.org> aŭ en Asante 126.

—Hoss

## La plej freŝa aĉjaĵo

Portas pensojn varmaj ventoj.
Mordas ilin frustraj dentoj.
Dubojn emo malestingu
por esperon reatingu.
Embarason timas iu.
Estontecon tiu sciu!
Ĉu antaŭen iru fide,
aŭ nenien tiel side?

—Aĉjo